


GRAVAJ



DATREVENOJ

Antaŭ 85 jaroj naskiĝis en Malaga :

Pablo PICASSO. — La hispana Picasso, genia pentristo, modlisto, ceramikisto kaj desegnisto, nun vivas kaj laboras sur la Lazura Mabordo. Li estas samtempe la plej ŝatata kaj la plej kritikata artisto de nia epoko. Grandegajn sumojn li ricevas por siaj artaĵoj. Eĉ nun li daŭre serĉas novajn art-rimedojn por sin esprimi



Antaŭ 65 jaroj naskiĝis en Jefferson (Usono) :

George GALLUP. — Tiu usonano havis la ideon fari metodaĵn enketojn ĉe la publiko mem por koni la opinion de la plej divers-devenaj kaj mediaj homoj. Lia instituto laboras por la politikaj partioj, industrio, kaj ĉiuj interesataj grupoj. La rezultoj de la enketoj estas ofte tre proksimaj de realeco. Similaj institutoj nun ekzistas en Eŭropo.



Antaŭ 50 jaroj mortis en Aix-en-Provence :

Paul CEZANNE. — Nur kiam li mortis la okuloj de la kritikistoj ŝajnis malfermiĝi kaj vidi lian grandan laboron. Li forlasis la etoson de Parizo, scenejo de la impresionistoj, por reveni al sia kvieta Provenco, kiu daŭre estis la temo de lia arto. La pentroarto de Cezanne estas fakte ponto inter la klasika tradicio de la franca pentroarto kaj la moderna.